

## **Kunvokilo**

### **Ĝenerala Ordinara Membrokunsido**

### **La 4an de julio 2015 en kastelo Greziljono je la 14 h 00**

La Ĝenerala Ordinara Membrojarkunsido estas kunvokita sabaton, la 4an de julio 2015. La registrado komenciĝas je 13 h 30.

La societanoj estas invitataj alveni en la kastelo ekde vendredo vespere: bv aliĝi en la retejo « [gresillon.org/aligho](http://gresillon.org/aligho) » por ke ni povu plani manĝojn kaj tranoktojn. Sabate vespere okazos balo, dimanĉe komitatkunveno. Inter lundo 6a kaj lundo 13a de julio okazos semajno « Ferioj - familioj - sciinterŝanĝoj » organizata de Elisabeth Barbay.

La societanoj kiuj ne povas ĉeesti, bonvolu sendi sian rajtigilon plenigitan per la nomo de societano ĉeestonta dum la Membrokunsido, kontaktinte tiun ĉi, por respekti la statutan regulon limigantan la nombron de rajtigiloj je 5 por ĉiu persono (vi povas konsulti la liston de la societanoj anoncintaj sian ĉeeston en la retejo, rubriko "Jarkunveno": « [gresillon.org/ag](http://gresillon.org/ag) »; NB: kaze de rajtigilo sen nomo, tiu ne uzeblas por voĉdonoj sed estos kalkulata por la kvorumo je 1/6 de societanoj - t.e. 48 - necesa por ke la Membrokunsido povu valide labori).

### **Tagordo**

- 1) Elekto de la kunsidaj prezidanto kaj sekretario
- 2) Nombro de ĉeestantoj kaj rajtigiloj
- 3) Evoluo de la nombro da societanoj, kontrolo de la kvorumo
- 4) Agadraporto 2014, diskuto kaj voĉdono (dum la kunsido)
- 5) Financa raporto 2014, diskuto kaj voĉdono (dum la kunsido)
- 6) Aprobo de la kontoj por la jaro 2014 kaj uzmaniero de la profito
- 7) Buĝeto 2015
- 8) Kvitigo de la Administra Komitato
- 9) Verda Vojo: akcepto de la longdaŭra lukontrakto
- 10) Laboroj: nuna situacio kaj prioritatoj
- 11) Politiko de malfermo: kiu klientaro kaj kiel atingi?
- 12) Demandoj diversaj

### **Evoluo de la nombro da societanoj**

La 31an de decembro 2015, kalkulinte forpasojn, donacon de societaj partoj, perdon de societanece se oni ne donas vivsignon dum tri jaroj, restis 288 societanoj kun 986 societaj partoj A.

Ni omaĝas al Pierre Babin, forpasinta la 2an de marto 2015, kiu estis kun sia edzino Luce kaj sia tuta familio la koro de Greziljono dum 40 jaroj. Vidu en « [gresillon.org/babin](http://gresillon.org/babin) »

### **Agadraporto 2014**

La jaro 2014 estis markita per pli alta nombro da luadoj, aparte la luo al infanferiejo dum tri semajnoj en julio, kaj nova deĵorantino en la kastelo: Isabelle Nicolas, kun kiu ni subskribis specifan kontrakton, certigas deĵoradon dum pluraj monatoj de la jaro, kun la celo evoluigi niajn aktivaĵojn.

Sen konsideri la deĵoradon de Isabelle Nicolas, la kastelo estis okupita 40% de la tempo (38 tagoj da staĝoj, 66 tagoj da luadoj, 24 tagoj da semajnfinaj laboroj, 9 tagoj da renkontoj ne-esperantistaj organizitaj de Isabelle Nicolas kaj 8 tagoj por Komitatkunvenoj kaj Membrokunsidoj). La staĝoj malmultiĝis: du staĝsemajnoj estis nuligitaj pro manko de partoprenantoj. Ĉiuj semajnfinoj, inter la malfermo martofine kaj la fermo novembromeze, estis okupitaj, sed la mezoj de la semajnoj restis ofte malplenaj.

## **Staĝoj**

Printempas venigis 48 ĉeestantojn de la 26a de aprilo ĝis la 3a de majo (estis la sama nombro kiel en 2013), el tiu 40 pagantoj (35 en 2013), kaj 26 trapasis la ekzamenon (22 en 2013). La ĵurio konsistis el Enikö Zengo Sereghy kaj François Lo Jacomo. La kursojn gvidis Radojica Petrovic, Christophe Chazarein kaj Jean-Luc Kristos. Jannick Huet estis staĝestro kaj Valérie Delaire kuiris.

La someraj staĝoj limiĝis je du semajnoj, la « Renkonto de memoroj » planita de la 11a ĝis 17a de majo kaj la « Turisma semajno » planita de la 29a de junio ĝis la 6a de julio estis nuligitaj. 79 personoj venis entute, de la 1a ĝis la 17a de aŭgusto, el tiuj 45 pagantoj. Bert Schumann staĝestris, helpata de Isabelle Nicolas, la programon okazigis Junĉjo, Luz, Nina, Nicky, Jean-Luc kaj la grupo Kapriol'. Frédéric Lahier kuiris.

Dum la semajno AŬTUNE (24a de oktobro ĝis 3a de novembro), ferioj por infanoj, familioj kaj geavoj, gvidata de Bert Schumann kaj animata de Stano Marček kaj Jean-Luc Kristos (kuiris Frédéric Lahier), 53 personoj ĉeestis, el tiuj 39 pagantoj. Dum 5 tagoj ĉeestis la koruso Interkant'.

Fine, la Novjara festo kun festeno okazis dum 5 tagoj kun 23 partoprenantoj, el kiu 12 pagantoj, koncerton kaj aktivaĵojn okazigis Jean-Manu kun sia skipo. Frédéric Lahier kuiris.

Entute, 38 tagojn da staĝoj ĉeestis 204 personoj (244 en 2013) kun 3340 manĝoj (4085 en 2013) kaj 1181 tranoktoj (1402 en 2013).

## **Luoj**

La duan jaron, la kastelo estas malfermita por luoj de eksteraj personoj. Inter la 14 luoj (15 en 2013), menciendas infanferiado « Loisirs Passion Jeunes » kiu luis la kastelon de la 7a ĝis 28a de julio, reduktinte tiom nian periodon de staĝoj. Tiu nura luo enspezigis al ni 9 570 € inkl AVI, t.e. 7 177 € nete. Ĝi ne ree okazis en 2015.

Tri luoj uzis nian kuiriston Frédéric Lahier.

Menciendas agadoj organizitaj de Isabelle Nicolas, i.a. la operacio de malfermitaj pordoj, kunlabore kun la turisma oficejo, dimanĉe, la 6an de aprilo 2014 (50 vizitintoj) ; la tagoj de l' ekonomio, ciklo de konferencoj pri ekonomio franclingve, de la 14a ĝis la 17a de majo ; la eŭropaj tagoj de kulturheredaĵo (80 vizitintoj), la 20an kaj 21an de septembro ; kaj ankaŭ la renkonto FRINGOJ por infanoj francaj kaj rusaj, organizita de Elisabeth Barbay de la 19a ĝis 26a de aprilo, la koruso Interkant', de la 8a ĝis 11a de majo kaj dum la staĝo Aŭtune, de la 24a ĝis 29a de oktobro, kaj ankaŭ la somera universitato de la partio EDE, de la 29a ĝis la 31a de aŭgusto.

## **Laboroj**

Dum 16 semajnfinoj, 27 tagoj, ni daŭrigis la laborojn komencitajn la antaŭan jaron. Post la konstruo de la nova ŝtuparo, la malnova estis malmuntita komence de la jaro, kaj la ĉambroj de la dua etaĝo, kiujn oni povas nun uzi danke al la nova ŝtuparo, estis iompostiom riparataj. La planko de la koridoro de la dua etaĝo estis riparata (finita en 2015), matracoj kaj litoj estis ŝanĝitaj, daŭris la anstataŭo de la pordoj per pordoj kontraŭincendiaj kun pordofermiloj. Aldono de fenestrobariloj, tapetado, translokigo de la pordo de la malpermesita zono post la ĉambron 26, riparo de elektraĵoj.

La plibonigo de la aspekto de la parko estis ankaŭ unu el niaj zorgoj: floroj kaj flormasivoj, senveprigo ĉirkaŭ la poplidoj. Certaj poplidoj plantitaj en 2013, mortintaj, devas estis replantitaj en 2015. Jean-Luc Kristos kaj Isabelle Nicolas restis plurajn semajnojn ekster laborsemajnfinoj por zorgi precipe pri la parko. Nia herbtondilo montriĝis nesufiĉa, tial okazis granda pripenso kiu devis finiĝi per aĉeto de nova tondilo en 2015.

Ni rememorigu la longdaŭran laboron de la informadika registrado de la biblioteko de Greziljono, diskrete daŭrigata de Dominique Baron, kiu realigas ankaŭ la inventarion de niaj vendataj libroj.

Ni danku al Anne-Marie Ferrier, Bert Schumann, Dominique Baron, Frédéric Lauriol, Gilles Picault, Gilles Tirard, Isabelle Nicolas, Jannick Huet, Jean-Jacques Moreaux, Jean-Luc Kristos, Matthieu Marcillaud, Michel Cousin, Nathalie Dubrulle, Robert Naulet, Stéphane Blavoët, Ugo de Maubeuge, Vito Markov, Yves Couturier, Yvette Corvaisier, kiuj partoprenis en 2014 en tiuj diversaj semajnfinoj.

## **Komunikado**

La retejo de Greziljono estis plene novigita, por adaptiĝi al poŝaj ekranoj, danke al volontula helpo de Matthieu Marcillaud kaj Bert Schumann. Nova prospekto pri Greziljono estis realigita kaj vaste dissendita.

## **Aliaj agadoj**

Frédéric Lauriol, helpata de pluraj kunlaborantoj, daŭre plibonigas sian « Tehnikan vortaron de Greziljono ». Fine, por faciligi certajn agojn, subvencipetoj, ktp... oni decidis fondi asocion « La Kampo de la Griloj », kiun prezidas Isabelle Nicolas kaj kies statutoj longe pridiskutiĝis. Sed la asocio ankoraŭ ne startis, ĉar la Administra Konsilio ne jam kuniĝis.

## **Financa raporto 2014**

La jaro 2014 havas pozitivan spezorezulton, je 4 576 €, danke al leĝera altiĝo de la rimedoj kaj nova malaltiĝo de la kostoj. Sed ni ne pagos imposton je firmaaj enspezoj.

La staĝoj ree leĝere malmultiĝis, pro tio notiĝas malpli da rimedoj ol da kostoj (krudmaterialoj = nutraĵo, transporto...). Kontraŭe, la luoj klare altiĝis, precipe danke al la infanferiado de julio.

La elspezoj por prizorgado kaj riparoj klare malpliĝis ĉar ni inkluzivis en 2013 certajn fakturojn de la nova ŝtuparo. Dankon al la volontuloj kiuj laboris senpage.

La pridungadaj elspezoj altiĝis. Al tio aldoniĝas la nova posteno « provizora dungitaro kaj komisipagoj por luoj » rezultanta i.a. el la kontrakto kun Isabelle Nicolas. Sed kompanse de tio kion ni pagas al nia deĵorantino, ni notas klaran malaltiĝon de transportelspezoj.

La laŭokazaj laboristoj kaj honorarioj inkluzivas la honorariojn de la advokato (2 880 €).

Ni notas klaran malpliĝon de la provizo por amortizoj, ĉar pluraj grandaj elspezoj plene amortiziĝis en 2013.

La impostoj altiĝis, precipe la Kotizo Nemoveblaĵa de Firmaoj (1 210 €), sed ni atingis la repagon de loĝada imposto (1 872 €) pagita erare en 2012.

La aĉeto de libroj ŝajnas klare altiĝi, sed tio rezultas el malvaloriĝo de nia stoko de libroj vendataj. Erare tiu stoko estis valorigita je ĝia vendoprezio, kvankam necesas valorigi ĝin je ĝia aĉetoprezio, ĉar la revaloriĝo fariĝas dum pluraj jaroj.

La poŝtkostoj restas malaltaj malgraŭ ambaŭ Ĝeneralaj Membrokunsidoj (Eksterordinara kaj Ordinara). 200 societanoj akceptis kunvokon per retmesaĝo.

La vendo de societaj partoj B, planita per la novaj statutoj, komenciĝis nur en 2015, tiu do ne aperas en ĉi tiu financa raporto. Hodiaŭ, 42 partoj B (8 400 €) vendiĝis al 10 personoj entute. Via partopreno estus tre aprezata.

MEMORIGO: La agadraporto, la financa raporto kaj la buĝeto estos voĉdonitaj dum la jarkunveno, same kiel la aprobo de la kontoj por la jaro 2014 kaj la uzmaniero de la profito, kaj kvitigo de la Administra Komitato.

## Verda Vojo: akcepto de la longdaŭra lukontrakto

Antaŭ tri jaroj, la Komunumaro prezentis al ni projekton de plilongigo de la verda vojo, kiu ekiras de La Flèche, por atingi Baugé laŭ kastelo Greziljono, uzante la spuron de la antaŭa fervojo, kies terenon ni aĉetis en 1987. Ni kaj deko da proprietuloj devis konsenti: unu el ili malfacilis, pro kio la projekto multe malfruiĝis. Nelge la aferoj akceliĝis: geometro venis por lokalizi la itineron de la verda vojo, kaj la Komunumaro petis nin formale aprobi la longdaŭran lukontrakton, kiun ni devas akcepti por ke ili povu efektivigi sian projekton. Pri tiu lukontrakto jam okazis diskutoj kaj amendoj. Se vi deziras konsulti presitan kopion, bonvolu tion peti. Aŭ vidi en nia retejo. « gresillon.org/ag »

## Laboroj: nuna situacio kaj prioritatoj

La laboroj daŭras en 2015: dua etaĝo (fenestroj de la ĉambroj 22 kaj 23, koridoro, pordoj...), eksteraj spacoj (aĉeto de tondilo), aĉeto de nova centralo de incendialarmo, riparo de la salono Zamenhof... kaj aliaj limdatoj atendas nin: ERDF (paso de mezensia lineo sub nia vojo), publika kloako, verando, vartado de la tegmento, dormĉambro kaj necesejo por handikapuloj, aldona ŝtuparo inter la unua kaj dua etaĝo ... Tiu tagorda punkto estos okazo por eksponi la progresadon de tiuj diversaj projektoj kaj por precizigi niajn prioritatojn. Kiujn laborojn ni konfidu al profesiuloj, kiujn aliajn laborojn povas fari volontuloj? Kiel organizi plej bone laborojn dum semajnfinoj aŭ semajnoj?

## Politiko de malfermo: kiu klientaro kaj kiel atingi?

Ne progresis nia cerbumado pri la evoluo de nia Civila Societo (transformo al Anonima Societo, Simpligita Akcia Societo, aŭ alia...). Sed la estonteco de Greziljono restas sur la tagordo. La luoj nun konsistigas gravan parton de niaj enspezoj: preskaŭ ĉiuj semajnfinoj ekster niaj staĝoj estas okupitaj. Sed la kastelo estas ĝenerale malplena dum la semajno: kiun politikon apliki por disvolvi tiun politikon de malfermo kaj por plialtigi la okupogradon de la kastelo? Kiun klientaron ni celu kaj kiel ni povas atingi ĝin? Tiu tagorda punkto estos okazo por precizigi la strategion aplikendan, konsiderante la kontrakton subskribitan kun Isabelle Nicolas.

## RAJTIGILO

Si vi ne povas ĉeesti la 4an de julio posttagmezo en Greziljono, bonvolu sendi vian ĉi-suban rajtigilon.

*Memorigo: ĉiu societano povas havi nur 5 rajtigilojn. Pliaj rajtigiloj ne kalkuliĝas. Blankaj rajtigiloj konsideratas favoraj por la akcepto de la agada kaj financa raportoj, por la aprobo de kontoj kaj la kvitigo de la Administra Konsilio. Blankaj rajtigiloj ne kalkuliĝas en la diskutoj pri la aliaj tagordaj punktoj.*



### RAJTIGILO

Sendu al ni se vi ne povas ĉeesti la Ordinaran Ĝeneralan Membrokunsidon.

Mi subskribinta: .....

rajtigas s-ron/s-inon.....

reprezenti min en en la **Ordinara Ĝenerala Membrokunsido** de la EsperantoKulturDomo, sabaton, la 4an de julio 2015 je la 14a horo

dato kaj subskribo